

La

1974-1

Esperero

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

Borlänge atendas kongreson

Partoprenante esperanto-kongreson oni volas iom scii pri la kongresurbo.

Borlänge, la loko por la jarkongreso de SEF en 1974, antaŭ longe estis vilaĝo en Stora Tuna, t. e. aro da bienoj, kie la kamparanoj loĝis kaj kie ili havis siajn kampojn kaj herbejojn. Parton de la tero, ekz. arbarojn kaj paŝtejojn, ili kune posedis. En multaj vilaĝoj la bienoj grupiĝis ĉirkaŭ vojo aŭ strato. Fariĝis "bygata". La nomo "Bygatan" ankoraŭ restas. Ĉirkaŭ ĝi troviĝis la malnova vilaĝo Borlänge kun kamparanoj, metiistoj kaj servistoj.

Kiel la nomo Borlänge estiĝis? La homoj sekvis la akvofluejojn en la landon. Ii veturis plej bone kaj sekure per boato. Kiam ili alvenis al torento, ili devis porti aŭ tiri la boaton. "Bor" signifas vojpeco, kie oni devas porti (levi) boatojn (varojn, ŝarĝojn). "Längan" da bienoj ĉe "boren" ankaŭ envenis en la pensojn, kiam oni diris la vorton. Tiel la vilaĝo ricevis la nomon Borlänge.

Dum jarcentoj la vilaĝo estis malgranda. Multo ne okazis tie kiel ankaŭ ne en aliaj vilaĝoj. Novaĵoj domoj anstataŭis la malnovajn, homoj mortis kaj homoj naskiĝis.

Sed — antaŭ ĉirkaŭ 100 jaroj — fervojo estis konstruita inter la du urboj Gävle kaj Göteborg. Ĝi kondukis tra Borlänge sur ponton super Dalälven. Tiam granda ferfabriko estis konstruita ĉe torento en la rivero kaj poste paperfabriko ĉe alia torento. Multaj homoj translokiĝis al la regiono.

Iom poste oni konstruis alian fervojon, per kiu oni povis vojaĝi el Stokholmo al la Siljanregiono. Ankaŭ tiu fervojo kondukis tra Borlänge. Pli da homoj translokiĝis tien. Domoj estis konstruitaj por butikoj, bankoj, metiistoj kaj por butikoj, bankoj, kiuj translokiĝis al Borlänge.

Iom post iom la nomo Borlänge ampleksis pli da vilaĝoj, kaj en 1944 Borlänge fariĝis urbo.

Ĉirkaŭ la urbo situas la paroĥo Stora Tuna kun la granda preĝejo, kiu estas multajn jarcentojn pli aĝa ol la fervojo kaj la ferfabriko. Oni opinias, ke ĝi devenas el la 13-a jarcento. Ĝi estas la plej granda provinca preĝejo en nia lando, kaj dufoje oni havis planojn nomi ĝin katedralo, kaj oni vere nomis la paroĥestrojn episkopoj. Sed multe pli frue Tuna estis religia kunven-loko. En Frostbrunnsdalen la malnovaj paganaj oferfontoj ankoraŭ bruetadas.

Multaj el la vilaĝoj en Stora Tuna estas pli grandaj ol Borlänge estis je ĝia komenco.

La homoj en Borlänge kaj Stora Tuna pli kaj pli interrilatis. Oni laboris en unu loko kaj loĝis en alia. Oni facile vojaĝis per fervojo aŭ sur ŝoseo.

La 1 jan 1971 Borlänge kaj Stora Tuna fariĝis unu komunumo, kiu ricevis la nomon Borlänge. Jam antaŭe la paroĥo Torsång kun sia bela malnova preĝejo kaj multaj vilaĝoj, inter ili Ornäs kun la tre konata "Ornässtugan", kuniĝis kun Stora Tuna. Multaj homoj konas la rolon, kiun "Ornässtugan" ludis dum la fuĝo de Gustav Vasa.

Do Borlänge nun estas granda komunumo, kiu konsistas el la tri partoj Borlänge, Stora Tuna kaj Torsång. Tie estas la multaj vilaĝoj sur



La preĝejo de Stora Tuna.

la fruktodona bela Tuna-ebenaĵo kaj en la arbara rando. Tie ankaŭ estas la altaj kaj longaj domoj, kiuj staras en la regiono, kiu antaŭe sole havis la nomon Borlänge. La enloĝantaro estas ĉirkaŭ 45.000.

En la komunumo troviĝas montoj kaj valoj, arbaroj kaj kampoj, (172) lagoj kaj riveroj, la granda Dalälven kompreneble estas unika. Ĝi serpentinumas tra la regiono kaj utilas en multaj manieroj. Krome ĝi beligas kaj variigas la naturon per torentoj kaj akvofaloj. Ĉe la akvofaloj nun estas elektraj stacioj, kiuj donas energion al ekzemple la paperfabriko Kvarnsveden kaj la feruzino Domnarvet (jam nomitaj). Domnarvet, la plej granda ferfabriko en Svedujo, fabrikas pli ol 1 milionon da tunoj da fero kaj ŝtalo jare. La paperfabriko Kvarnsveden fabrikas ĉirkaŭ 300.000 tunojn da papero jare. Inter ĝiaj klientoj estas ĵurnalaj kaj gazetaj entreprenoj en ĉiuj mondpartoj.

Krom tiuj tre grandaj industrioj multaj aliaj ekzistas, grandaj kaj malgrandaj. Post la ŝanĝado de la fervoja sistemo en Borlänge kaj la pligrandigo de la fervoja regiono tie, kelkaj centraj stok(ej)oj estas lokitaj tie, ekz. KF, ICA ktp.

Borlänge (kun Stora Tuna kaj Torång) hodiaŭ estas la plej ekspansiva regiono en Dalekario kaj ludas esencan rolon por la evoluo de la tuta gubernio. Krom la jam nomitaj fervojoj kaj ŝoseoj ekzistas ankaŭ regulaj flugkomunikoj havantaj konektojn kun 150 svedaj lokoj. Per ĉartitaj aviadiloj oni ankaŭ de "Dala-Airport" povas rekte atingi multajn libertempajn celojn en ekz. la Mediteranea regiono.

Borlänge estas lerneja loko. Jam en la jaro 1559 la paroĥestro Carolus Petri starigis lernejon apud la preĝejo. Por tiu lernejo, kiu estis "djäkneskola" la reĝo donis subvencion, nome iom da greno.

Nun la gimnazia instruado en Borlänge ampleksas ĉiujn branĉojn, kaj praktikaj kaj teoriaj. Ankaŭ teknikan liceon Borlänge havas. La popolaltlernejo Fornby estas konata. Por la plenkreskuloj ekzistas multaj studeblecoj.

En Borlänge estas bonaj eblecoj por sportoj kaj vivo en la freŝa aero tiel somere kiel vintre. La bela Mellstaregionon havas tri-stelan tendejon kaj ankaŭ elektre lumigitajn skisporojn. Multaj aliaj ski-regionoj ekzistas, ekz. sur la montega tereno "Gyllbergen", kies plej alta punkto atingas 501 metrojn super la maro. Gyllevallen havas arte glaciigitajn areojn por glaciĥokeo. La sufiĉe nova sporthalo Maserhallen donas eblecojn por diversaj sportoj. Ĝi ankaŭ havas bonan naĝohalon. Sur Domnarvsvalen la futbala teamo Brage ludas.

Mi ne povas fini la rakonton pri Borlänge sen menciigi almenaŭ du famulojn, kiuj naskiĝis kaj pasigis la infanecon tie, nome nia granda himnverkisto J. O. Wallin kaj la same granda operkantisto Jussi Björling. La laste menciita estas enterigita en la tombejo de Stora Tuna. **A.-L. Liss**

Semajno de internacia amikeco

Internationella Vänskapens Vecka infaller i år 18—24 februari. Varför inte inbjuda till en festlig sammankomst med något program i anslutning till temat för veckan: vänskap över gränserna? En offentlig sammankomst bör helst ske i samarbete med andra organisationer och speciellt inbjudna.

Enskilda esperantister, som har vänner i andra länder — det har vi nog alla — bör lämpligen höra av sig, i varje fall med en kort hälsning på ett brevkort. En lämplig gåva är faktiskt en bok från det svenska Esperantoförbundet, Fack, 200 42 Malmö 7. Där expedieras och ansaffas allt i Esperanto-bokväg. Studera gärna annonserna i tidigare La Espero eller i UEA:s årsbok, del 2. Beställ nu. Om boken ej råkar vara inne, så underrätta mottagaren och sänd sedan boken, då den kommer.

Men just för denna vecka finns stiftelsen AMIKECO TRANS LIMJOJ. Den erbjuder brevmärken att sätta på kuvert eller kort (pris 60 öre per ark om 6 st.). Dessutom finns det postkort för 40 öre/st. för större och 20 öre för mindre. Vidare finns det affischer (som Ni kan erbjuda butiker etc.) för 11 öre st. Brevmärken, postkort, affischer beställs **endast** hos Stiftelsen AMIKECO TRANS LIMJOJ, Fack, 692 02 Kumla 2 (nås även per tel. 019/860 00 Karin Larsson). Postgiro 14 32 10-3.

SEF

VÄNSKAPENS VECKA

18—24 febr.

Välj PRESENTBOKEN

till utlandsvännerna från vår boklista i La Espero nr 6/1972.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7
Postgiro 578-5

Redaktoro:

Kiel vi trovas de informoj aliloke en tiu ĉi numero, la esperantistoj tra la tuta mondo ankaŭ ĉi-jare oficiale celebros la lastan planan semajnon de februaro — 18—24 — kiel La Semajno de Internacia Amikeco.

Tiu semajno, kiun iniciatis antaŭ kelkaj jaroj s-ano Carlén, fariĝis en pluraj lokoj granda sukceso, ekz. en Ĉikago, kie la urbaj aŭtoritatoj oficiale akceptis la ideon.

Por esperantistoj internacia amikeco ja estas io tute natura — almenaŭ ĝi devus esti. Ni havas niajn kongresojn kaj aliajn internaciajn renkontiĝojn, ni korespondas, ni havas geamikojn en diversaj landoj.

Sed ni eble emas forgesi, ke al la plej multaj homoj tute mankas internaciaj rilatoj kaj ofte ankaŭ kompreno por aliaj popoloj, por amikeco trans limoj. Ni ne bezonas tiurilate nur pensi pri la akraj konfliktoj en Mezoriento aŭ Azio; eĉ en okcidenta Eŭropo tute ne regas tia interkompreno kaj emo al kunlaboro, kiun oni devus atendi en niaj evoluintaj landoj.

Ni svedoj tute ne fieru. Ni estas sufiĉe katenitaj en naciaj kadroj, en naciaj pensmanieroj. Konscie aŭ nekonscie ni havas antaŭjuĝojn pri aliaj popoloj, kiuj devenas de niaj historio, edukado, medio.

Oni konsideras la Semajnon de Internacia Amikeco grava okazo atentiĝi ankaŭ pri nia movado. Speciale se ni sukcesas interesigi la aŭtoritatojn pri la afero, ni povas tiel gajni respekton ankaŭ por esperanto.

Sed la ideo mem estas pli profunda. Amikeco trans la limojn — kiom ni, esperantistoj, kontribuas al ĝi? Ĉu tiom kiom ni kredas? Estas unu afero havi amikajn sentojn al konatoj en diversaj landoj, homoj, kun kiuj ni korespondas kaj eble persone renkontiĝis. Sed estas tute alia afero pensi internacie, provi rigardi la problemojn el tutmonda vidpunkto, provi kompreni la situacion kaj la opiniojn de fremdaj popoloj. Ĉu ni tion faras?

Kion vi diras, ekzemple, pri la nuna energia krizo, kiu minacas vian komforton kaj sekurecon? Aŭ kion vi pensas pri la gastlaborantoj en Svedujo?

A. L. Liss

SEF en packongreso en Moskvo

De la 25-a ĝis la 31-a de oktobro okazis en Moskvo Monda Kongreso de la Pacamikoj kun pli ol 3.000 partoprenantoj el 144 landoj, reprezentantaj pli ol 1.000 organizaĵoj kun tre diversaj politikaj kaj ideologiaj koloroj. Post kontaktoj kun la sveda organiza komitato por partopreno en la kongreso SEF sukcesis ricevi inviton al tiu grandega aranĝo. Partoprenis en la nomo de SEF Ingrid Maier, studentino en la universitato de Uppsala.

La temaro de la kongreso estis vastega. Diversaj komisionoj okupiĝis interalie pri la jenaj problemaroj: Kunlaboro inter registaraj kaj neregistaraj organizoj; Sociaj problemoj kaj homaj rajtoj; Kunlaboro en ekonomio, scienco kaj tekniko; Kunlaboro en edukado kaj kulturo; Paco kaj Sekureco en Mezoriento; Imperiismo, koloniismo, rasismo. En la kadro de la laste nomita komisiono mi havis okazon prezenti paroladon antaŭ ĉ. 400-homa aŭskultantaro, en kiu mi atentigis pri la lingvaj aspektoj de imperiismo kaj pledis por la apliko de esperanto en internaciaj rilatoj.

La sveda delegacio — entute 23 personoj — konsistis ĉefe el politikistoj [Bertil Zachrisson (s), Stellan Arvidsson (s), John Takman (vpk)

k. a.], sed ankaŭ el verkistoj kiel ekzemple Lars Forsell, membro de la Sveda Akademio, kaj Arvid Rundberg. Krome ĉeestis reprezentantoj de diversaj svedaj Pac-organizaĵoj, de sindikatoj, unu reprezentanto de SUL kaj aliaj. Eble la plej konata sveda partoprenanto estis la episkopo de Stokholmo, Ingmar Ström. Kun ĉiuj ĉi mi havis bonajn, en iuj kazoj bonegajn, personajn kontaktojn, kun la plej multaj mi diskutis interalie ankaŭ pri esperanto.

En la kongreso ĉeestis ankaŭ areto da esperantistoj (mi renkontis — pli malpli hazarde — proksimume dekon), kiuj havis inter si bonajn kontaktojn dum la tuta daŭro de la kongreso. Ĉiuj kune ni vizitis la Moskvon Esperanto-klubon, kiu surprizis per alta nombro da ĉeestantoj en normala semajna grupkunveno kaj vigla intereso pri kaj nia kongresa laboro kaj la esperantista vivo en niaj hejmlandoj. Miriga estis ankaŭ la arda deziro ricevi esperanto-librojn, por kiuj multaj pretas pagi kiom ajn altajn sumojn. Mi transdonis kelkajn librojn en la nomo de svedaj esperantistoj, kio provokis ŝtorman aplaŭdon flanke de la Moskvaj ĉeestantoj.

La rezultojn, kiujn tiu reprezentado alportis al la esperanto-movado kaj al SEF, mi vidas ĉefe en la diskutoj kun tiuj svedaj delegaciaĵoj, el kiuj multaj konsiderinde ŝanĝis sian antaŭan opinion pri esperanto — aŭ unufoje ekhavis opinion. Interesa en tiu konteksto povas esti citaĵo el letereto de episkopo Ström, kiun mi ricevis post la kongreso: "Mi opinias, ke estas grava tasko stimuli la publikan opinion por enkonduki esperanto-instruadon en la lernejojn. Nur tiam vere io povos okazi, kaj la konsekvencoj povas estis grandaj."

Konklude mi ŝatus diri, ke mi opinias utile kaj necese por esperantistaj organizoj partopreni en la ekste-

ra politika kaj socia vivo, aŭdigi sian voĉon antaŭ grandaj aŭskultantaroj kaj influu influhavajn personojn. Nur tiamaniere io povas konsiderinde ŝanĝi en la antaŭenigo de esperanto.

Ingrid Maier

Junularo diskutos pri edukado

La ĉiujara somera aranĝo de TEJO ĉifoje prezentas sin sub alia nomo: la titolo "konferenco" sekvas la tendencan de TEJO-kongresoj al pli serioza kaj faka laboro, atentata ankaŭ en neesperantista publiko. Sed ĝi ne signifas ke la organizantoj de la 30-a IJK, okazonta de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto en la nordokcidentgermana urbo Münster, forgesis la gravecon de la IJK kiel plej grava internacia renkontiĝo de la esperantista junularo.

La loko de tiu renkontiĝo estas universitata urbo situanta 290 km sudokcidente de Hamburgo. Ĝi havas 200.000 enloĝantojn, inter ili 30.000 studentojn. Krom la kutima pluvo kaj la bone konservita historio (ekzemple estis Münster kie finiĝis la 30-jara milito kaj naskiĝis libera Nederlando) karakterizas ĝin 28 preĝejoj en la urbocentro, multaj administracioj, parkoj kaj nekopieblaj drinkejoj.

Inter la studentoj troviĝas grupeto

Vad är det som döljer sig bakom denna skrytfasad?

**VARÅGOD!
HÄR KOMMER ETT PAKET
FULLT AV NYTTIGA
ÖVERRASKNINGAR.**



Esperantoforbundet
December 1973

Vi har gjort ett häfte som talar om olika sätt att informera. Inga teoretiska resonemang. Rakt på sak. Det är en idésamling och en katalog på allt informationsmaterial som finns till klubbarnas förfogande.

Här presenteras: olika små affischer, broschyrer, föredrag, olika flygblad, en affischutställning, förslag på böcker och tidskrifter lämpliga att ställas ut på en utställning, annonser, in-

formationskuvert till intresserade... Men framför allt finns många praktiska tips med om vad en klubb kan göra, när den vill informera om esperanto — både i smått och stort.

Din klubb har redan fått häftet. Se till att innehållet i det diskuteras och häftet kommer till användning.

ESPERANTOFORBUNDET

da esperantistoj, kiu decidis helpi al Bermana Esperanto-Junularo en ĝia embaraso, kiun kaŭzis la neceso organizi la 30-an IJK.

Sub la temo "Junularo kaj Edukado" la konferenco traktos problemojn de atlerneja reformo, de profesia instruado, de lingvoinstruado kaj celoj de eduka politiko. Al la programo apartenas seminario pri la rilatoj inter lingvo kaj politiko same kiel la kutimaj eroj: balo, akceptoj, kulturaj, ekskurso kun folkloro akcento kaj laborkursidoj de TEJO.

La partoprenantoj loĝos en modernaj studentaj domoj, plejparte en individuaj ĉambroj kun plena komforto. Malgraŭ tio la kotizoj restis moderaj: ili varias inter 75,— kaj 140,— germanaj markoj (DM), depende de aĝo, aliĝdato kaj TEJO-membreco. Tiu kotizo inkluzivas ĉion.

Por profiti de pli malaltaj kostoj, kaj ankaŭ ĉar la nombro de lokoj ne estas senfina, estas preferinde aliĝi laŭeble frue, Petu la informfolion ĉe: 30-a IJK, p/a Gisela Jungkamp, D-44 Münster, Mondstrasse 3; Fed. Resp. Germanio.

Du efikaj prelegvojaĝoj



I. Jean Guillaume, Francujo. En la somero 1973 SEF faris interkonsenton kun s-ro Guillaume, ke li faru prelegvojaĝon tra nia lando pere de sia propra aŭto. Li antaŭe vizitis Svedujon kaj eĉ faris prelegvojaĝojn, sed la sistemo veturi per aŭto estis arango nova kaj praktika, ĉar li kunprenis materialon por tri diversaj prelegoj, inter kiuj la lokaj kluboj povis elekti: Unesco kaj ĝia laboro, La Riviero kaj la Savado de la Egiptaj monumentoj. En Parizo kaj Marseille li akiris tre belajn kaj taŭgajn bildojn kolorajn, kaj en la lasta semajno de septembro li venis al Malmö post aŭtomobilveturado de Parizo tra Eŭropo. Li faris la unuan prelegon en Malmö kaj veturis nordon.

La ĵurnalistoj en la diversaj urboj, kiujn li vizitis, tuj montris intereson kaj helpe de la interpretisto li respondis al ĉiuj demandoj. S-ro Guil-

laume postlasis multajn bildojn kaj pli multajn artikoletojn en la sveda gazetaro, kiujn multaj observis.

Li vizitis 30 urbojn kaj faris 45 paroladojn (25 pri Egiptujo, 15 pri Riviero, 5 pri Unesco) antaŭ 1.585 personoj. Entute li veturis 4.600 km. kaj atingis la urbon Umeå en la nordo. Kiam li foriris, li menciis, ke li vizitis 10 muzeojn kaj 14 uzinojn aŭ fabrikejojn. Sed li kunprenis ankaŭ verajn memorarojn, ĉar en la aŭtomobilo li zorge kaj kun vera ĝojo kolektis diversajn donacojn, kiujn oferis al li dankemaj klubanoj.

II. Albino Ciccanti, Italujo. La konata pastro Ciccanti el Rimini jam frue informis alvenon al Skandinavio en la aŭtuno, kaj Norvegujo, Svedujo, Finnlando kaj Danujo streĉe atendis la alvenon. Fine li venis al Oslo, kaj fininte sian norvegan viziton kun sia programo pri la Sankta Francisko kaj pri italaj vidindaĵoj (kun kolorbildoj) li rapide trairis Svedujon por atingi Stokholmon kaj la ŝipon al Finnlando. Nur post la fino de la prelegvojaĝo en tiu ĉi lando li de Stokholmo zig-zagis tra nia lando survoje al Danujo. Interese estas rimarki lian surprizon, kiam li tuj kontaktiĝis kun Norrköping, Linköping, Jönköping, Lidköping, kie oni parolis pri Falköping.



Ĉar temis pri nur kelkaj lokoj entute, li opiniis ke oni nur aldonu la malfacilajn prefiksojn al la urboj, kies finaĵo estas "ping".

La gazetaro en la urboj, kiujn li vizitis, raportis pri liaj prelegoj kaj pro la fotoj (li surhavis centiskan uniformon) la vasta publiko atentis la aferon kaj legis la artikoletojn. Entute 12 urbojn li vizitis dum la rapida "trakurado" de nia lando, sed li havis tempon ne nur prelegi sed ankaŭ viziti preĝejojn, fari ekskursojn, paroli kun la gesamideanoj ktp.

Laŭ Ciccanti la movado Esperantista en la skandinaviaj landoj estas tre forta. Ni ĝojas pro tio, kaj ni ĉiuj ne nur konservu tiun staton sed konstante plibonigu ĝin.

Str.

Rondvojaĝo

Eble pro mia normanda deveno, la Skandinavaj landoj ĉiam forte altiris min kaj kiam Jan STRÖNNE petis min fari propagandan vojaĝon tra Svedujo, mi tuj jese respondis.

Kvankam mi jam iris dekofoje, ĉu por Esperanta manifestacio, ĉu por komercaj aŭ inĝenieraj aferoj, mi ĉiam trovas novajn interesarojn.

Tiun ĉi fojon la okazaĵoj estis pli multenombraj, ĉar mi veturis aŭtomobile. Dank' al tio, mi faris 4.600 kilometrojn en la lando, restadis en 30 urboj kaj pro la bonaj organizoj, mi povis fari 45 paroladojn en diversaj medioj. Unue ĉe la esperantistaj kluboj, sed ankaŭ ĉe la lernejoj kaj, neatendite, ĉe la domoj por maljunuloj, ĉe la handicapuloj kaj en la kontraŭalkohola asocio, kompreneble kun la helpo de samideanoj aŭ samideaninoj.

La rekordo estis en Universitato antaŭ 300 gestudentoj, dank' al S-ro FARM.

Sed aliaj personoj kontribuis diversmaniere al la sukceso de la entrepreno kaj sen nomi ilin ĉiujn, mi volas esprimi ĉi tie mian sinceran dankon, ankaŭ pro la helpo kaj bonkora gastameco kiun mi ricevis en la diversaj urboj.

Nun mi deziras doni kelkajn el miaj memoraroj kiuj plej forte impresis min.

Unue, la kulturaj aferoj estas mirindaj. Kiam oni vizitas la kulturajn

domojn, oni estas frapita de la multenombraj aktivecoj. Oni povas lerni lingvojn, artojn, sciencojn, manlaborojn, kaj vespere oni povas vidi personojn de ĉiuj aĝoj, kiuj vizitas la kursojn. — Mi havas la impreson, ke la Svedoj soifas je scipovo.

Plie, la bibliotekoj estas rimarkeblaj. Tie oni libere eniras, elektas meme librojn, eksidas en komforta seĝo, prenas notojn en silenta atmosfero. Ofte mi havis la okazon tie legi francajn aŭ anglajn taggazetojn, netroveblaj en vendejoj.

La fakto, ke nur 5 personoj rajtas krei kurson, ke pro tio ili ricevas subvencion kaj ĉambron, kaj la gvidanto salajron, kun ebleco trinki kafon, estas, mi kredas, unika arango en la mondo. Oni devas diri, ke por la kulturaj celoj estas konkurenco kaj stimulo inter la diversaj asocioj, ĉu laboristaj, ĉu oficistaj, ĉu religiaj, ĉu politikaj, ĉu kamparaj, ĉu instruistaj, ĉu antialkoholaj, ĉu sportaj. — Ĉiuj havas specialajn sidejojn kie oni organizas ĉiuvespere kursojn, konferencojn, metilernadojn kaj oni eĉ povas interesiĝi en hobiaĵoj.

Por fini pri tiu punkto, mi deziras menci la riĉecon de la muzeoj, la bone konservitajn mezepokajn kastelojn, la diversstilajn malnovajn preĝejojn, la pitoreskajn centjarajn konstruaĵojn en naturaj medioj, eĉ kun miro mi vidis du grandegajn monumentojn desegnitajn de Picasso.

La plej aĝa e-klubo en la mondo

(Almenaŭ laŭscie seninterrompe dum la plej longa tempo aktiva klubo.)

La 21-an de novembro Grupo Esperantista de Stokholmo festis sian 75 jaran jubileon. Samtempe estis enaŭgura festo en nova bela ejo, certe la plej belan ni iam havis.

Kolektiĝis multaj membroj kaj gastoj, ankaŭ el malproksimaj lokoj. La prez. de SEF Jan Ströme faris la longan vojaĝon de Malmö por honorigi la klubon. En sia gratulparolado li transdonis salutojn de ĉiuj svedaj esperantistoj, kaj dankis al la klubo en la nomo de ĉiuj esperantistoj en la mondo pro ĝia sindona kaj efika laboro dum la jaroj por porti la movadon antaŭen. Li men-

ciis multajn nomojn de pli fruaj klubanoj kiuj estis altrangaj esperantistoj ankaŭ en la internacia movado. La gloraj nomoj de Paul Nylén, Ernfrid Malmgren, Sam kaj Sam Oven Jansson, kaj Birger Gerdman estas konataj kaj admirataj tra la tuta esperanta mondo.

Poste Bertil Åkerberg, kluba kasisisto, rakontis pri la historio de la klubo de la vera komenco en la jaro 1898 kiam Paul Nylén, veninte el Upsala, fondis ĝin.

Rakontante pri la sorto de la klubo li igis nin sekvi la okazintaĵojn tra la jaroj; dum la malhelaj tempoj de la du mondmilitoj, la ido-skismo, la mondkongreso en la jaro 1934, la ŝanĝoj de ejoj, pli malpli bonaj, kaj menciis la nomojn de tiuj kiuj persiste, jaron post jaro portis la plej grandan parton de la kluba laboro. La nomoj estis multaj; Paul Nylén, Teodor Julin (ankoraŭ fidela membro kiu ĉiusemajne vizitas la ejon), Ernfrid Malmgren, Nils Hedgren, Sune Ahlm, Sigvard Håkansson, kaj multaj aliaj, ne menciitaj sed ne forgesitaj.

Li finis memorigante pri Alfhild Svedmark kiu estis mastrino dum sinsekvaj 31 jaroj, kaj samtempe li dankis la nunan mastrinon Astrid Ljungberg kiu transprenis la laboron post la morto de nia Alfhild.

La prez. de la klubo en Norrköping, Nils Johansson, ĉeestis kaj transdonis gratulon de sia klubo, kaj Wilhelm Grahn, prez. de KELI, salutis de sia federacio. En la nomo de la eksterlandaj gastoj parolis la bulgario Gabriel Nestorow, Folke Resén salutis kaj gratulis en la nomo de la laborista klubo.

Sekvis amuza programo kun kanto, deklamo kaj muziko de Maud Pelz, Marie Hansen kaj W. Härle.

Je la kaftablo ni miksis komunan kantadon kun kafo kaj delikataj buterpanoj per kio la klubo regalas ĉiujn gastojn, kaj por vere substreki la festan okazintaĵon S-ro Malmkvist malavare donis grandajn delikatajn tortojn kiujn ni ĝoje kaj dankeme akceptis... Estis vespero miksitita kun ĝojo kaj melankolio.

Melankolio kaj doloro je la memoro de tiuj kiuj por ĉiam forlasis nin post senlaca servo en la movado, lasante la laboron al ni kiuj restas sentante nian devon sekvi iliajn spurojn.

Tamen ni sentis ĝojon, ke ni povis kolektiĝi en tiu aĝa klubo kiu ankoraŭ servas, agas kaj funkcias kiel utila membro de la internacia rondo de kluboj, kaj ke ni povas rigardi antaŭen esperante pri progreso kaj prospero en venontaj tempoj.

Solveig Edvardsson

en Svedujo

Nun mi iros al aliaj facetoj. Kun granda ĝuo mi vizitis diversajn fabrikojn, kaj mi estis impresita de la bona organizo kaj efikeco. La laborantoj ŝajne laboras en komfortaj cirkonstancoj. Oni ne tro laborigas ilin, sen premoj. Ili havas tempon por trinki varman aŭ malvarman trinkaĵon, kelkafoje ili havas muzikon. Mi admiris modernajn oficejojn kun moveblaj ekranegoj, la seriozon de la kontrollaboristoj, la dividon de la laboroj de la grandaj firmoj en diversaj malgrandaj urboj. Mi rimarkis, ke en la laborejoj oni respektas la regulojn de la sekureco. En bruemaj lokoj, la laboristoj devas uzi orelprotektilojn, kelkafoje okulvitrojn. La maŝinoj havas efikajn protektilojn.

Fine meritas gratulojn la urboj kiuj havas centran hejtadon kaj distribuas varman akvon al preskaŭ ĉiuj domoj. Tiel la ĝenerala polucio estas malpli granda.

Sekve, mi parolos pri sociaj aferoj, kiuj estas tre interesaj. Sano estas la unua grava punkto kaj la ŝtato havas specialan atenton por ĉiuj enloĝantoj. En firmoj kaj lernejoj ekzistas konstantaj kontroloj de kuracistoj, senkoste. Hejma kuracado kostas malmulte, ĉu por kuracisto, ĉu por medikamentoj. Rimarkinde estas, ke vendado de medikamentoj kaj alkoholaĵoj estas ŝtata monopolo kaj la nombro de tiaj vendejoj estas

dekfoje malpli granda ol en Francujo, sed verŝajne sufiĉa.

Jen trafa ekzemplo de la propagando por saneco: En du urbetoj, mi havis la okazon vidi centojn da familioj kiuj laŭvice marŝis tra la stratoj, sur la trotuaroj dum la dimanĉa mateno. Mi pensis pri manifestacio. Post enketo mi lernis, ke estis nur higiena rekomendo de la lokaj aŭtoritatoj ke la tuta loĝantaro devus marŝi dum tiu dimanĉo ĉar marŝado estas benefika por la sano.

La domoj por maljunuloj estas multenombraj kaj komfortaj. Ili havas apartajn ĉambrojn kun ĉiu komforto, restoracion, spektaklojn, materialon por laboreti, ekzemple teksmaŝinojn sen motoroj kaj ilojn pri labori lignon.

En magazenoj mi rimarkis specialajn enirejojn por handicapuloj en veturiloj, liftojn kaj necesojn por ili. En restoracioj la gepatroj envenas kun infanoj en bebeturiloj. — Handikapulo povas aĉeti je duonprezo bonan aŭtomobilon. — La lernejoj estas senpagaj, kaj oni servas senpage bonan lunĉon. La pensioj de la laboristoj estas sufiĉe bonaj, sed principe oni laboras ĝis la 67a jaro.

Sed por tiuj gravaj avantaĝoj la ŝtato bezonas monon kaj discipline oni dekalkulas la impostojn de la salajroj. Demokrate la malaltaj salajroj pagas kvaronon de la ricevita mono, sed por altaj salajroj la im-

postoj estas la duono de la salajroj.

Nun, el turisma vidpunkto: mi revidas la grandegajn arbarojn kun la trankvilaj akvoj de la lagoj kaj serpentumaj riveretoj; la plej grandan ponton de Eŭropo kiu kondukas al la pitoreska insulo Öland mi admiris dank' al S-ro KINDGREN. Mi revidas la du alkojn, kiuj manĝis parton de betrikolto de kamparano, la antikvajn stonojn de tombejoj aranĝitajn en granda boatformo, kaj tombmontetojn, la fascinantajn spektaklon de la blovanta vitroartisto.

Dank' al tio, eble por okupi la longan vintron, la svedoj havas agrablajn okupojn, pentras, muzikas, brikolas objektojn el ceramiko, lignajn objektojn, teksaĵojn. Eĉ viroj faras lanajn tapiŝojn. Kia pacienco! Tio estas benefika por la beleco kaj komforto de la domoj.

Eble el sveda vidpunkto miaj rimarkoj ŝajnas banalaj, sed por iu kiu travojaĝis la kvin kontinentojn kaj pro tio faris multajn komparojn, la sveda atmosfero estas ĉe la supro de la homa progreso. Jam plurfoje mi rimarkis, ke en Francujo oni kopiis svedajn ideojn kaj konklude mi esperas, ke pli kaj pli oni uzos en la mondo la bonajn ekzemplojn de tiu lando.

En tiu favora grundo certe nia esperantista movado devas flori dank' al niaj dinamikaj gesamideanoj.

Jean Guillaume

Ni bezonas kulturajn revuojn!

Mi komencas mian artikoleon per la jaro 1955. Jaro de granda optimismo, ĉar du gravaj revuoj ekaperis, la nica literatura revuo kaj Norda Prismo. Redaktoro por la unue-nomita estis Gaston Waringhien. Redakta komitato estis: Roger Bernard, Régulo Pérez, Tomàs Pumpri, Reto Rossetti, Ivo Rotkviĉ kaj Raymond Schwartz. Bedaŭrinde mia lingvoscio estis nesufiĉa kiam mi estis abonanto (1957). Sed kiam mi nun trafolumas la jarkolekton, mi trovas ĝin interesa. Mi volas mencii novelon de Marjorie Boulton, "Tiel kiel ĝi ne okazis". Carma fantazio pri Adamo kaj Evo en Edeno kaj ankaŭ satiro pri diĝestoj laŭ Usona modelo, Poul Thorsen prilaboris en tre "diĝesta" maniero. Temas pri Hamleto, Fausto, Robinson Kruso, La oldulo kaj la maro (paĝo 138 nro 4 1957).

Daŭris ĝis 1962.

Norda Prismo, kultura, socia, literatura revuo, dumonata.

Redaktoro: d-ro Ferenc Szilágyi.

La revuo aspektis alloga, post la unua trarigardo la impresoj estis, tro malfacila por mi. Sed post plia foliumado, mi komencis legi humorajn de "Olli" kaj nun la apetito estis vekita. Dum la jaroj kiam mi estis leganto de Norda Prismo mi ĝuis bonegajn novelojn en originalo aŭ tradukitaj. Interesaj artikoloj pri artistoj el diversaj fakoj. La lastaj paĝoj en ĉiu kajero sub rubriko "LIBRO-KULTURO" mi zorgeme tralegis. Kiam F. Szilágyi recenzis iun libron la kritikisto ĉiam estis bonvola kaj milda.

La ekonomio de la revuo ne estis tro bona, pro nesufiĉa nombro da abonantoj. Post la morto de d-ro F. Szilágyi (1967) s-ro William Auld fariĝis ĉefredaktoro.

Dimanĉe, la 21 de aprilo, estos la tago por la

ekzamenoj en Esperanto 1974,

kaj elementa kaj supera. Informojn vi povas peti de Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg (tel. 031-40 52 74) aŭ de Oskar Svanteson, Skonertgatan 1, 421 74 V. Frölunda (tel. 031-29 03 81).

**SVEDA
ESPERANTOINSTITUTO**

Preskaŭ samtempe aperis la japana PROMETEO, trimonata sendependa gazeto. Se mi ne eraras ĝi estis eldonita de radikalaj studentoj kaj meritis pli longan vivon. Aperis 6 kajeroj ek de jaro 1960 ĝi vivis kune kun LA SUDA STELO: revuo socia-literatura-kultura-arta. 3 valoregaj kajeroj estis la rezulto de ĉi tiu nekutima kunlaboro.

UEA provis per 2 kajeroj BELARTO (1958, 1961) kaj poste per la revuo MONDA KULTURO (1962—1966). Redaktoroj estis komence William Auld poste dum kelkaj numeroj D-ro Andreo Albault.

La listo pri regulaj kunlaborantoj estas impona kaj mi bedaŭras ke tiu valorega revuo ne trovis sufiĉe grandan nombron da abonantoj. La tuta kolekto, 15 kajeroj, estas ankoraŭ havebla, bindita en du volumojn — frandaĵo por literaturamantoj.

De ĉi tiuj menciitaj revuoj Norda Prismo havis la plej longan vivon, eble ĝi daŭros se la esperantistoj montras sian intereson. Laŭ anonco de Esperantoförlaget ĝi peras abonon de Norda Prismo, Kulturaj Kajeroj, Literatura Foiro kaj aliaj gazetoj.

Se vi opinias ke kulturaj revuoj en esperanto estas bezonataj, tuj mendu kaj, ne malpli grave, legu. Vi povus diskuti la enhavon dum klubkunvenoj, bonega ekzercado de la lingvo, ĉu ne?

Bengt Alsén

Islandaj radioj

Tre interesa lando pro sia alieco. Delonge mi revis kun mia familio pri libertempo en Islando. Fine tiu revo realiĝis je plena nia kontenteco. Ni supozis ke en julio la vetero en Islando estas plej agrabla kaj ni aliĝis, kiel membroj de sveda-islanda societo, al 18-taga vojaĝo al Islando.

Tiu vojaĝo signifis nur komunan flugon de Kopenhago al Reykjavik kaj returne. Reston ni devis prizorgi mem. Oni avertis nin ke liberaj ĉambroj dum somero estas malfacile troveblaj. Kun peno ni sukcesis mendi privatan ĉambron por unuaj 3 tagoj en Reykjavik.

Ni alvenis dumnokte al flughaveno Keflavik situanta 50 kilometrojn for de la ĉefurbo. Keflavik estas usona milita bazo. Ĉirkaŭ la flughaveno estas urbo loĝata de preskaŭ nur usonaj soldatoj kaj iliaj familioj: kune ĉ. 6000.

Dum la aŭtobusa veturo al la terminalo en Reykjavik ni jam povis vidi je ambaŭ flankoj de la ŝoseo la tipan islandan pejzaĝon: malglata, sterila, kovrita de lavaaj formoj. Arboj ne ekzistas en Islando krom

unu sola arbaro plantita en la mezo de la insulo inter la du plej grandaj urboj: Reykjavik kaj Akureyri kiu situas en la nordo ĉe la Norda Glacia Maro. Oni plantis ankaŭ arbojn ĉirkaŭ domoj kaj vilaoj, versajne antaŭ nelonge ĉar ĉiuj arboj estas malgrandaj kaj kriplaj. Kelkloke oni vidas duonabundan herbon kaj arbustojn. Ĉie en la "kamparo" sin paŝtas multaj ŝafoj kaj malaltaj ĉevaloj.

La tuta meza kaj orienta partoj de Islando estas glaciejo. Nur 1 % de la insulo estas kultivebla. La loĝantaro estas ĉ. 200.000 el kiuj preskaŭ la duono vivas en Reykjavik. Krom en kelkaj urboj kaj vilaĝoj oni vidas domojn nur ĉirkaŭ la varmaj fontoj kiuj liveras senpagan varmon.

Reykjavik, la ĉefurbo de la respubliko ne faras impreson de granda metropolo. Sed ĝi estas pura kaj kun speciala atmosfero.

La vivnivelo estas egala al tiu de la ceteraj skandinaviaj landoj. Alta loĝeja kulturo. Turista movado plivigliĝas, kun ĝi plialtiĝas prezoj. Rimarkindaj estas la tegmentoj pro sia diverskoloro.

Dum la vizitado al Reykjavik niaj inaj familianoj dediĉis multe da tempo al aĉetado de islandaj lanaj jakoj, vere belaj kaj duonprezaj kompare kun tiuj ĉe ni. En Reykjavik kaj Akureyri ni ĉiutage vizitadis al la urbaj eksterdomaj naĝejoj. La vetero estis malbona: pluvo, vento. Estas vera plezuro tiam naĝi en 40-grada akvo.

La normala temperaturo de tiuj fontoj estas 80° C sed oni miksas la akvon kun trinkakvo. Apud la granda naĝejo estas kelkaj pli malgrandaj kun diversaj temperaturoj. En unu ni kapablis eniri nur ĝis la genuoj.

Post kelkaj tagoj en Reykjavik ni luis aŭton kaj, laŭ konsilo de turistoficejo, ni ekveturis unue al loko nomata Laugarvatn en la montaro. Plurfoje dum nia vojaĝo ni tranoktadis en t. n. Edda-hoteloj, sufiĉe bonaj sed ne luksaj. Generale la prezoj en Islando estas iom pli altaj ol en Svedujo.

Dum la veturo al Laugarvatn ekstis truo en pneŭmatiko, pro tre malbonaj vojoj. Ni ne sufiĉe alte taksis ke ni ne veturis tro rapide. Post

Du har vâl inte glömt

ESPERANTO-NYTT

SEF:s fyrasidiga informationsblad. Utkommer en gång i kvartalet. Korfattad. Väredigerad. Lämpar sig för spridning bland politiker, skolfolk, bibliotek etc.

Pris: 2: — kr per år.

Adress: Voxnegrand 24,

121 60 Johanneshov.

Postgiro 20 65 88

la ŝango de la rado ni ne kuraĝis veturi pli rapide ol 60/hore multfoje eĉ pli malrapide.

De Laugarvatn ni ekskursis al Geysir kie ekzistas ankoraŭ unu funkcia gejsiro, t.e. kavo en la tero el kiu ĉiujn 2—3 minutojn sprucas bolanta akvo al alteco de 20—30 metroj, neforgesebla travivaĵo.

De Geysir estas nur kelkdeko da kilometroj ĝis Bullfoss, unu el plej belaj akvofalegoj de Islando. Malgraŭ terura malvarmo ni restis kvazaŭ hipnotitaj de la beelco de tiu akvofalo. Revenante al nia aŭto ni povis filmi le reĝan danan paron ĵus alveninta por oficiala vizito. Malfeliĉa reĝino Margrethe, post eliro el la aŭto de la islanda prezidento apenaŭ malfermis pluvombreton antaŭ ol ŝi retiriĝis en la aŭton: ŝiaj vestoj some-raj kontrastis akre al la orkana vetero tie.

Sur la vojo norden ni haltis en Tingvellir por viziti malgrandan preĝejon, kie en 1944 oni proklamis la sendependecon kaj finon de la unio kun Danlando.

Ni daŭrigis norden kaj orienten tra belegaj valoj kun akvofaloj kaj pitoreskaj vilaĝetoj kaj alvenis al Akureyri, la dua urbo de Islando. De tie ni daŭrigis al Myvatn-lago. La belecon de tiu lagaro forigas mirindaĵoj da malgrandaj muŝoj kiuj plenigas la aeron kaj arogante eniras en nazon, orelojn, okulojn, buŝon.

Daŭrigante orienten laŭ la marbordo ni preter pasis fabrikon por silicio kaj poste alvenis al grotoj kun 40-grada akvo. Tuj ni banis nin tie por varmigi nin. La akvo en tiuj grotoj estas tiel pura ke oni volus paŝi sur ŝtonegojn kuŝantaj sur la fundo sed estis profunde 5—6 metrojn. Ĉiujn 5 minutojn la tuta kvanto da akvo ŝanĝiĝas, konstante cirkulante.

Poste ni haltis inter la fosforaj fontoj kun vere luna pejzaĝo. Tie kaj tie kavoj en la tero kun bolanta grizbruna fluidaĵo, ĉio ŝajnas nereala, songa.

Revenante al Reykjavik laŭ alia vojo ni vizitis lokon nomatan Dimborgir kun fantomaj formacioj de lavao; grotoj, rokoj, labirintoj, preskaŭ neeble trovi vojon. Ĉe la enirejo

HELSINGÖR 1974

tuj antaŭ UK de Hamburgo

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.—27. de julio en La Internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Hamburgo.

Karavanvojaĝo el Helsingör al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝata per trajno speciala por la kursanoj.

Programo senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando

pendis tabulo kiu avertis la turistojn.

Post reveno al Reykjavik ni faris ankoraŭ ŝipan ekskurson al duoninsulo Akranes kie ekzistas fabriko produktanta cementon el mortintaj mituloj kiujn oni kolektas el la maro. Entute neforgesebla ekskurso.

La islandanoj estas afablaj, helpemaj. Ilian lingvon oni ne povas kompreni aŭskultante sed multajn vortojn svedo divenas ĝin legante. Forlasinte tiun landon oni konservas agrablan rememoron kaj emon reveni.

E. Rytenberg

Ere-parkere

1. Senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon
2. Spiko malplena plej alte sin tenas
3. Suspekto pruvon ne egalas
4. Ŝparu kiam bone, vi havos kiam bezone.
(Spiko = ax.)

Ni lernu per la eraroj

"La klubkunveno komencas (?) merkrede je la 19-a horo." Tiu ĉi esprimo estas erara. Komencas estas transitiva verbo. Tial: Oni komencas la kunvenon je la 19a h. Sed: La kunveno komenciĝas je la 19-a h.

La laboristoj en la fabriko komencas la laboron je la 7-a matene.

Sed: la laboro komenciĝas je la 7-a h. **T. M.**

VETERANOJ FORPASIS


TORSTEN ELIASSON

Mortis 28/12. Ano de la Esperanto-klubo de Hästveda dum multaj jaroj. Vera idealisto. Esperanto estis lia ĉefa intereso. Por honorigi lian memoron la klubo, la anoj kaj aliaj donacis monsumon al SEF.

Ĉina Esperanta monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonantojn 1974



Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno akirebla senpage

ABOUNU ĈE ELDONA SOCIETO ESPERANTO EN MALMÖ

LASTMINUTA INFORMO

La Pacpremio de la Pacasocio de Stockholmo (Stockholms Fredsförning) estas ĉi-jare dediĉita al **Jan Strönne** la prezidanto de SEF. Pluaj informoj en la sekvonta numero.

Ĉeĥa mezaĝa inĝeniero-entuziasma amatora fiŝkaptisto serĉas svedan esperantistan saminteresulon. Skribu al: Ing. Fr. Ondruš, Hrbová 34, 75501 VSETÍN, Ĉeĥoslovakio.

LETERVESPERO!

La Esperanto grupo, entute 40 gesperantistoj kaj lernantoj en urbo Rostock aranĝos je la 19-a de Februaro 1974 okaze de Semajno de Internacia Amikeco

LETERVESPERON!

Bonvolu, sendu al ni viajn korespondedezirojn, bildkartojn, librojn ktp. Ni garantias almenaŭ unufoje respondon aŭ alian rekompencan. Skribu al:

Sekretario de
Distrikta laborrondo Rostock
de Kulturligo de GDR
GDR-25 ROSTOCK 1
Kröpeliner Strato 25

KOMUNIKO

Okaze de la granda turisma movado al Romo antaŭvidita por la sankta jaro 1974—1975, la provinca turisma organizaĵo de Romo (E. P. T.) sin deklaris preta republiki bildajn broŝurojn pri romaj monumentoj kaj vidindaĵoj en esperanto, kondiĉe ke ĝi konstataĵ pro la nombro da petoj, la utilon kaj la oportunon de tia lingva broŝurpresado.

Sekve ĉiuj interesatoj, personoj kaj grupoj, estas konsilataj peti senprokraste esperantlingvaj broŝurojn skribante al: E. P. T., via Parigi n. 1, 00187 Roma, Italujo.

Lasta dato por manuskriptoj por la sekvonta numero de La Espero: 28 februaro.

Ĝenu tid!

Vi upprepar anmälningavgifterna till kongressen i Hamburg. Den halvfeta siffran gäller till 31 mars, siffran inom parentes efter detta datum. Se även artikeln i förra numret av La Espero.

1. Kongresano, ne-membro individua de UEA: **185**:— (201:—).
2. Kongresano individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ): **159**:— (176:—).
3. Kongresano individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA): **134**:— (151:—).
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1: **130**:— (141:—).
5. Edz(in) o de Kongresano en kategorioj 2 aŭ 3: **112**:— (124:—).
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara: **56**:— (61:—).
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara: **93**:— (101:—).
8. Blindul(in)o: **73**:— (80:—).

NI HAR GLÖMT

betala UEA-avgiften för 1974. Postgiro är 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

Skriv MA på talongen, betala 60 kr. och Ni får årsboken och varje månad tidn. Esperanto.

Skriv MS på talongen, betala 90 kr. och Ni får detsamma men räcker UEA en hjälpande hand. Det behövs faktiskt.

Larmguto

De Octavian GOGA

*Se vi emus iam disdoni
Riĉaĵojn kiujn vi havas,
El ĉiuj viaj donacoj
Mi petus larmguton de vi.*

*Tiam, eron de Panim' donus vi
Levigantan el la profundo,
Ja, nur el mara abismo
Oni povas la perlon kapti.*

Tradukis el la rumana

Eugenia Morariu

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö 7
Ejo: Möllevångsgatan 20 B



Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkredo 10.00—11.00
ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.



Administranto: Anna-Greta Strönne
Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

SKAFFAR ALLT I ESPERANTO—LITTERATUR

Välj i UEA:s årsbok

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,
Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.
Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).
Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr,
ungdom 10 kr, familjemedlem utan
tidning 5 kr.

Prenumerationspris 20 kr.

Förbundets sekretariat är öppet
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1974